

Claude GACOND kaj Michel FRESARD:

Unuiĝintaj Nacioj aŭ Unuiĝinta Naciaro ?

Radioprelego de Claude GACOND kaj Michel Frésard, SRI, 1986.02.08

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-163/Radiokasedo-163-4-86-A-1013-Claude-GACOND-Michel-FRESARD-Unuighintaj-Nacioj-au-Unuighinta-Naciaro.mp3>

Cl.- Parolas Claude Gacond kaj Michel Frésard nome de Svisa Radio Internacia.

La rubriko LETEROJ AL MONATO estas. tutcerte unu el la intresaj forumoj ekzistantaj en la esperanto-gazetaro. Interŝanĝiĝas vidpunktoj pli malpli pasie kaj esprimiĝas ofte meditivaj kritikoj. En la numero novembro 1985 de MONATO certe rimarkindas la letero de la hungaro István NAGY, kiu aperis sub la enigma titolo SUK. Fakte ne temis pri la institucio Someraj Universitataj Kursoj, sed pri la ĉiam sukcesaj Universalaj Kongresoj. Ni citu la enkondukajn liniojn de la artikolo:

M.-"La novaj esperantistoj tre rapide, mallante (ankaŭ mi riĉigas la lingvon) spertas, ke la Universalaj Kongresoj ĉiam estas sukcesaj. La plej grava kriterio de la sukceso estas - sperto de cent jaroj - la nombro de la partoprenantoj. Do, ĉiu UK estas SUK, tio estas Sukcesa Universala Kongreso (SUKcesa)."

Cl.- Stilo vigla, sprita servas la ideojn de la aŭtoro, kaj tiuj ideoj aŭ kritikoj indas je atento. Sed István NAGY lerte demonstros, ke SUK por la 70-a UK en Aŭgsburgo eble signifas, ke ĝi estis Skandala. Ree ni citu lin:

M.- "Sed... leginte en MONATO n-ro 8/85 la raporton pri la 70-a UK en Aŭgsburgo, ankaŭ ĝi estas SUK, sed ĉi-kaze S signifas Skandala, do Skandala Universala Kongreso. El la tri skandaloj - se mi bone kalkulis - jam unu sufiĉus por meriti ĉi tiun epiteton, sed tri!"

C1.- Multaj el vi legas la revuon MONATO, do ni lasas al vi la privilegion malkovri tiun ĉi skandalon. Kvaran fakte mencias István NAGY. Ĝi estas simple lingva. Ni citas lin:

M.- "En la Rezolucio de Tago de la Paco mi legis, ke "...kiel - evolui plej efike la strebadon..." kaj sub la noto 5 "Korekte devas esti evoluigi". Kiom ofte legeblas, ke Esperanto evoluas (kaj ne evoluiĝas)! Tamen 120 "kongresaj esperantistoj" el 23 landoj ne kapablis traduki simplan frazon, kvankam Esperanto estas la plej facila lingvo..."

Cl.- István NAGY konkludas sian leteron levante lingvan demandon.

M.- En nia kara lingvo la vivo (uzo, praktiko) solvas la lingvajn problemojn, precipe tiun de la vort-uzo. Sed iel la vivo ne ĉiam klopodas, penas plenumi sian ege gravegan taskon. Jen nun nur du (bela stilo, ĉu ne ?) ekzemploj : Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj aŭ Unuiĝinta Naciaro, kaj komunumo aŭ komunaĵo. ...Ke ne ekestu umo-aĵo-batalo (umistoj-aĵistoj) en la movado antaŭ la centjariĝo, iu aŭ iuj diru jam fine: kio organiziĝas en Okcident-Eŭropo? Eŭropa Komunumo aŭ Eŭropa Komunaĵo? Aŭ la tuta esperantistaro atendu la decidon de la vivo? Ree ekpikis min la scivolemo. Ĉu la vivo estas pli saga ol 27 aŭ 43 lingvistoj, lingvaj profesoroj, verkistoj, tradukistoj, unuvorte lingvaj fakuloj aŭ kiel diri... akademianoj? Se ĉiam decidas la vivo, ĉu Akademio estas bezonata?... Cetere kio pli gravas koncerne la decidon: la logiko aŭ la ofteco? Koncerne ĉi-lastan, kiu nombras kaj kiel ke el la vortoj komunumo-komunaĵo, kiu estas plej ofte uzata, presita en la gazetaro? Kontraŭe, se gravas la logiko, la

decido ne povas esti tiel malfacilega, ja temas pri facila, logika lingvo ! Jen kiom da pensoj, problemoj post la legado de simpla, sed sincera raporto pri la ĉiujara granda sukcesa renkontiĝo de la esperantistaro. Vere: Sen Jara Kongreso Haltus la Progreso !

Cl.- Tiuj iom mokaj vortoj de István NAGY ekkonsciigu multajn, ke en esperanto ekzistas realaj lingvaj demandoj. Fine de oktobro organiziĝis du seminarioj ĉe Kultura Centro Esperantista por celebri la 40-an jaron de UNO. Kaj la diskutoj, kiuj sekvis la interesajn raportojn, montris, ke la du nomoj Unuiĝintaj Nacioj kaj Unuiĝinta Naciaro ne kovras la saman lingvan realecon, kaj ke en lingvo internacia, tio havas pli da graveco, ol oni ĝenerale imagas. Ekzistas fakte nacioj, kiuj ne havis internan unuecon. Kaj en certa momento okazis tiu disvolviĝo al unueco. Tiam oni povas paroli pri nacioj unuiĝintaj, opozicie al tiuj, kiuj nuntempe unuiĝas. La nacioj unuiĝantaj. Kaj tiuj, kiuj sentas la bezonon unuiĝi, sed ne ankoraŭ ekagis favore al tiu unuiĝo. Ili estas nacioj unuiĝontaj.

M.- Ha, mi komprenas. Kiam oni diras: Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj, oni fakte parolas pri organizaĵo, kiu grupigas naciojn, kiuj ĉiu individue unuiĝis.

Cl.- Vi pravas. Kontraŭe, la esprimo Organizaĵo de Unuiĝinta Naciaro klare diras, ke estas la naciaro, kiu unuiĝis.

M.- Mi kredis, ke la sola diferenco inter la du vortoj nur konsistis en tio, ke la pronomo por Unuiĝintaj Nacioj estas ili, dum tiu por Unuiĝinta Naciaro estas ĝi, kio pli konvenas al lingvo kia estas Esperanto. Sed nun mi komprenas, ke aldone estas signifo-diferenco grava.

Cl.- En la franca lingvo kaj tre verŝajne en la aliaj naciaj lingvoj utiligataj en Unuiĝinta Naciaro la esprimo plurala "Nations Unies" havas plurajn signifojn. Ĝi signifas samtempe Unuiĝintaj aŭ Unuigitaj Nacioj, kaj ekzistas dusignifeco, ke ĉiu unuope travivis la unuigan fenomenon, aŭ ke kune ili unuiĝis sin. Tiu plursignifeco ne havas realan gravecon en la naciaj lingvoj, ĉar en ili ne ĉefas la logiko, sed la uzo. Oni scias, ke tiu uzo donis la signifon unuiĝinta naciaro, kaj ne unuigita.naciaro, kaj ke temas nek pri grupiĝo de unuiĝintaj nacioj, nek pri grupiĝo de unuigitaj nacioj. Sed en esperanto la formo mem de la vorto devas kongrui kun ties signifo.

M.- Tio signifas, ke nepre sin trudos la signifo Organizaĵo de Unuiĝinta Naciaro.

Cl.- Jes, malgraŭ la provo de profesoro d-ro Ivo Lapenna pravigi la formon Unuiĝintaj Nacioj, pro tio, ke ĝi estis unue proponita, kaj ke ĝi aperis en tradukoj publikigitaj de UNO mem. Esperanton karakterizas daŭra evolu-procezo.kiu iras de blinda imito de la nacilingvaj formoj al posta, emancipiĝo el tiu influo per memkreo de taŭga formo. La esprimo "decidas la vivo" fakte spegulas la profundan senton en ni ĉiuj, ke oni ne devas decidi tro rapide. La pioniro Lapenna volis kiel eble plej fidele kopii la nacilingvan formulon. Sed lia naturalismo ne povas konveni al esperanto, kies spirito ne estas naturalisma. Tial apud la naturalisma formulo netaŭga nepre devis naskiĝi pli konvena formulo. Kaj kiel ĉiam estas, oni vidas konfrontadon inter la du uzoj, konfrontado ŝuldata al du sintenoj. Unuflanke oni volas resti fidela al la unue elektita solvo, aliflanke oni volas fidelecon al la spirito mem de la lingvo. En tiu ĉi debato la vivo ĉiam venkigas la fidelecon al la spirito de la lingvo.

M.- Estus bone doni ekzemplojn kun aliaj duopoj, kies kunekzisto spegulis saman interlukton de naturalisma kaj autonoma formuloj.

Cl.- Jes, tion ni faros alian sabaton.

M.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude GACOND kaj Michel FRESARD diras al vi : ĝis la venonta sabato!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014*